

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni prezentis al vi la progresigan legolibron de esperanto kun lingvaj ekzercoj de William Auld, kiu estas titolita *Paŝoj al plena posedo*.

A.- Jen ni legas al vi la legaĵon de la unua leciono aŭ paŝo unua. Ĝin verkis Ferenc Szilágyi, kaj ĝi aperis en *Norda Prismo*. Ĝia titolo :

Cl.- *Tre moderna fabelo*.

A.- *Tiu ĉi eksterordinaran kaj freŝdatan fabelon mi nur peras transigante la respondecon al mia tre fidinda amiko – ni nomu lin Sen Dubo – kiu la unuan fojon rakontis ĝin ĉe blanka tablo, kie ne mankis glasoj.*

Cl.- « *Aŭdu nur* » - *diris Sen. « Mia amiko, Ripsrops, veturis antaŭ nelonge per sia beleta ĉaro, vi scias, tiu Mercedes, inter Arĥangelsk kaj Kopenhago sur la ŝoseo.*

A.- *Sed li jam ne estis malproksime de Kopenhago, kiam ĉe benzinputo, post kiam li aĉetis hejtmaterialon kaj dum la agado de la benzinulo, li iom promenis.*

Cl.- *Subite li aŭdis voĉon sub si :*

A.- « *Sinjoro Ripsrops, sinjoro, bonvolu atendi...* »

Cl.- *Ripsrops rigardis malsupren kaj vidis ranon ruliĝantan al li.*

A.- *Li ne estas speciala ŝatanto de ranoj, sed io kaptis lin en la afero.*

Cl.- « *Ĉu mi komprenas rane ? Kaj ĉu vi povas paroli? Ĉu vi konas min ?* » *La rano respondis :*

A.- « *Jes, kara sinjoro Ripsrops, mi povas paroli, sed mi ne parolas rane, sed dane. Mi petas vin, sinjoro Ripsrops... Mi frostas. Metu min en vian poŝon. Ĉu mi rajtas kunveturi al Kopenhago ? Por bonfaro vi ricevos bonon !* »

Cl.- *Ripsrops tre miris, precipe, ke la rano frostas, kiam estas varme, sed rano estas rano, kaj ĉar la petita varmo ne kostas al li elspezojn, li metis la ranon en sian poŝon. (Kion vi diras ? Jes... Jes, li estis sopra kiel mi.)*

A.- *Iom post iom la rano iĝis hejmeca ĉe Ripsrops. Ĝi petis eĉ manĝon kaj iom da akvo, kiujn Ripsrops, kiu konsideris la ranon cetere tre modesta, donis al sia kunvojaĝanto.*

Cl.- *Tiel ili alvenis vespere al la metropolo, eĉ al la loĝejo de Ripsrops, ĉar la rano petis ripozlokon. Ripsrops malfermis la pordon de sia loĝejo kaj tiam la rano denove ekparolis :*

A.- « *Kara sinjoro Ripsrops, mi estas tiel dormema. Ĉu mi rajtus dormi en tiu lito ?* »

Cl.- *Ripsrops ekmeditis. Estis la unua fojo, ke iu fremdulo volis dormi en ilia familia lito, sed efektive sinjorino Ripsrops estis for kaj tiu ĉi mirinda rano estis tiel dormema. Li metis la ranon en la apudan liton kaj demetis sian jakon kaj komencis pretigi sin por la nokta trankvilo.*

A.- *Li volis jam mallumigi, kiam li alrigardis la apudan liton kaj kiam li rimarkis, ke el la stranga rano fariĝis belega reĝidino, kiu supozeble apenaŭ estis provizita per noktovestoj.*

Cl.- *Lia rigardo ekglitis sur la marmoraj ŝultroj de la reĝidino. Ripsrops tute teruriĝis. Li frotis la okulojn. La reĝidino alrigardis lin kaj diris :*

A.- « *Ri-i-ipsĉjo !* »

Cl.- *Sen Dubo, tio estas la rakontanto, nun faris longan paŭzon kaj sekvis iom malcerte la ŝvebon de la cigareda fumo.*

A.- *Mi urĝigis :*

Cl.- *« Nu, kiel estis poste ? »*

A.- *Sen Dubo alrigardis min kaj diris :*

Cl.- *« Ĉu vi vere kredas tiun ĉi historion ? »*

A.- *« Kredi ? Tute ne. Kial mi kredu ? »*

Cl.- *« Nu ankaŭ sinjorino Ripsrops, kiu tiumomente realvenis neatendite el sia feriado en Polinezio kaj malfermis la pordon de la dormoĉambro, ne kredis ĝin. Eĉ ne unu vorton... »*

A.- Fino de la legaĵo de la unua paŝo. La lernantoj povas trovi en vortaro la signifon de la plej malfacilaj vortoj. Jen kelkaj ekzemploj :

Cl.- *Puto : subterejo, el kiu oni levprenas kutime akvon.*

A.- *Ŝvebi : resti senmove pendanta, kvazaŭ fluge.*

Cl.- *Sobra : Malebria.*

A.- *Rano ; vivantaĵeto, kiu loĝas sambone teron kaj akvon.*

Cl.- Tiu ĉi klarigo de la vorto **rano** vekis diskuton, sed ni malkovris, ke ĝi sufiĉe bone taŭgas. Lernantino, kiu ne konis la vorton **rano** hezitis inter la bestoj **bufo** kaj **rano**.

A.- La du unuaj ekzercoj, kiuj sekvas la legaĵon celas devigi la lernantojn plurfoje tralegi la legaĵon. Jen kelkaj el iliaj demandoj :

Cl.- *Kion faris Sen Dubo kaj lia amiko antaŭ ol tiu lasta rakontis la fabelon ?*

A.- *Kial Ripsrops haltigis sian aŭtomobilon proksime al Kopenhago ?*

Cl.- *Kiun lingvon parolis la rano ?*

A.- Kaj tiel plu. Sekvas respondoj. La lernantoj devas trovi la faritajn demandojn. Poste William Auld donas temon de verkaĵo : *« Kion, laŭ via opinio, diris s-ino Ripsrops al sia edzo, kiam li rakontis sian historion? (Skribu detale !)*

Cl.- Fine ni trovas tri ekzercojn. La unua devigas la lernantojn elekti ĝustajn verbojn, la dua kaj tria formi frazojn ekde donitaj vortoj.

A.- La venontan semajnon ni ĵetos rigardon al kelkaj tiuj vortfaradaj, gramatikaj aŭ stilaj ekzercoj. Tiel vi estos ricevintaj tre bonan kaj detalan informadon pri la lernolibro *Paŝoj al plena posedo* de William Auld, kies studadon ni konsilas al ĉiuj progresemaj esperantistoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-